



Unum ovile et unus pastor.
Unu ŝafejo kaj unu paŝtanta.
(JOH., X, 16.)

ESPERO KATOLIKA

INTERNACIA MONATA GAZETO, OFICIALA ORGANO de I. K. U. E.

Letero al S-ino Z.

Kara fratino en nia Savinto,

Kiel kristanino, kiel esperantistino, mi sentas min devigata tuj respondi al la duobla demando esprimita en via letero:

- 1) Kiel kondukti rilate al nova konvertito?
- 2) Ĉu estus utile por tia persono ĉeesti niajn esperantistajn katolikajn kongresojn?

Kara amikino, mi timas esti tromemfida respondante, — tamen min premas la deziro rekomendi al via boneco, al viaj specialaj preĝoj, la junulon, pri kiu vi parolas.

Vi loĝas en regiono, kiu restis ĉiam fidela al la Eklezio; vi neniam havis okazon interrilati kun protestanto. La tasko, kiu nun sin prezentas al vi, estas do nova, malfacila.

Vi diras, ke vi ne komprenas la hetizojn de via nevo. Liaj timoj, kelkaj strangaĵoj en liaj paroloj surprizas vin. Tamen vi volus lin helpi.

Malfacile estas respondi, amikino, ĉar pri via kara nevo mi scias nenion krom lia absoluta sincereco kaj profunda amo al Dio. Mi scias nenion pri la historio de lia konvertiĝo. La kaŭzoj de tia grava ŝanĝo povas esti ja tiel diversaj!

Se oni demandas al kelkaj neofitoj, kio ilin speciale altiris al la Eklezio, kredeble ĉiuj respondoj estus malsamaj. Laŭ ĉies mentaleco, la Dia graco prezentis al la animo unu aŭ alian flankon de la Eklezia perfekteco. La esplorama intelekto kun admiro elstudadis la harmonian unuecon de la katolika dogmaro. La praktika spirito trovis en la rimarkinda organiziteco de la Eklezio la idealan regnon, en kiu lia anima vivo pli plene, pli utile disvolviĝos. Alia, pli timema, serĉas, sur la Roko de Petro, rifuĝejon kontraŭ la timigaj ondoj de herezo, kiuj disbatas ĉiujn sektojn, ĉiujn domojn, ne konstruitajn sur la Die starigita Ŝtonego. Diversaj estas la vojoj al la Vero.

Sed se, preterlasante tiujn eksterajn konstatojn, ni povas observi la internajn krizojn, kiujn la animo devis travivi por alpaŝi de la nokto de eraro en la Veran Lumon, ni admiras la paciencan amon de Dio, kiu tiel fidele rekondukis hejmen la forvagintan idon, — kaj ni sentus grandan kompaton al la filo humile alproksimiĝanta sian Patron.

Eminenta Prelato iam diris al neofito, ĉe lia riceviĝo:

„Longan, longan vojaĝon vi plenumis, frato” . . .

Efektive, en tiu longa baraktado kontraŭ la medio mem, kiu formis ĝian mentalecon, la premita animo angore serĉas la direktantan stelon, kiu montros la vojon al la Vero. . .

Kaj sur tiu vojo, kiom da malamikoj kontraŭstaras! Tiu intelekta sendependeco, tiu fiereco, kiun protestantoj konsideras kiel virton, — tiu malhumileco, kiu longe rifuzas submetiĝi al iu ajn, al io ajn, — tiuj ĉie dissemitaj antaŭjuĝoj, kiuj distordas la instruojn de la Eklezio ĝis neakceptebleco, — ĉion tion nur post dolorigaj horoj la Graco fine superas.

Kaj ĝi estas korŝira, la penso, ke parencoj, amikoj mallaŭdos, ke ili kun indigno sin deturnos; ke en la familio la dolĉa paco, la intimeco estos detruita; ke eble eĉ mankos la vivrimedoĵ . . .

Dio sola scias, kiom suferiga estas tiu memofero,

Kiam fine ellacigita, la neofito atingas la sojlon de la Eklezio, kian konsolon donas al li la pacienca karito de

liaj katolikaj fratoj! Karito, kiu ne ofendiĝas, — karito, kiu scias atendi. . . .

Ĉar nur iom post iom la graco plenlumigas la animon. Nur iom post iom ĉio klariĝas kaj la spirita vivo komencas disvolviĝi normale.

Memoru, amikino, ke, dum la katolikoj — eĉ la plej juna infano — libere elĉerpas fortojn el la Dia trezorejo de la Eklezio, la nova konvertito nur hezitante alpaŝas al la fonto de Graco. Li apenaŭ scias balbuti kelkajn duon-konsciajn esprimojn de amo kaj konfido al sia kompatema Patrino, la Sankta Virgulino. Por li, la sanktuloj estas kvazaŭ nekonitaj fratoj. La Rozario ŝajnas nekomprenebla. La konfeso havas nedireblajn timigaĵojn. Sed, super ĉio, ĉe la antaŭa individualista protestanto, kia luktado kontraŭ liaj plej profundaj emoj, ĝis la tago, kiam per preĝo kaj studado, estos elkonstruita la nova hejmo de lia animo! Kiom da altaj baroj devos esti disĵetataj de la Graco, antaŭ ol la Lumo plene enfluos! . . .

En tiuj malfacilaj tagoj, kuraĝiga kaj refortiga estas la interparolo kun fervoraj, sed indulgemaj kristanoj, kiuj kun sagaceco komprenas la dubojn, la malfacilaĵojn de la nova frato.

En niaj esperantistaj katolikaj kongresoj, kie kuniĝas tiom da piaj, kleraj pastroj ĉiulandaj, la neofito ĉiam trovos konsilon kaj apogon; tiu, kiu ankoraŭ dubas, estos kore akceptata, ne kiel suspektindulo, nek kiel fremda eksterulo, sed kiel frato ankoraŭ disigita, sed tamen inda je simpatio pro lia sincera deziro elkoni la Veron.

Dum niaj pacaj, amikaj kunvenoj, ĉiuj malakordiĝoj, kiuj turmentas la novulon, — kvankam ofte nur malkompreniĝoj, — povas esti libere pridiskutataj; ĉiu malfacilaĵo libere elmontrata. Sub la gvidado de la Sankta Spirito, kristanoj tiamaniere plibone interkonatiĝos, kaj okazos, — por kelkaj, espereble — efikaj paŝoj al unuiĝo.

Dio permesu, ke, dank' al nia internacia lingvo, en multajn animojn disradiu la Lumo!

Adiaŭ, amikino.

Ĉiam via „RAMO”.

La Pastro.

Ni vidas inter ni viron, kiu frapante malsimilas al ĉiuj aliaj, alia pri la vestaĵo, sintenado, konduto. Li vivas sole, lia familio estas la homa societo; li estas okupata ĉiuflanke kiel juĝanto, konsilanto, paciganto.

Li akceptas la infanon novnaskiĝintan, por enkonduki ĝin en la vivon kaj fine ĝin enterigi. Sen li oni povas nek vivi nek morti, ĉar li benas lulilon kaj ĉerkon; sen li oni trovas la feliĉon nek en tero nek en ĉielo.

Lin amas, honoras kaj timas jam la infanoj, lin nomas eĉ nekonintaj „sia patro”, antaŭ li la kristanoj konfesas siajn pekojn, antaŭ li ili malkovras siajn pensojn plej sekretajn; li estas la vokata, rajtigita, ne erarebla kuracisto de l' animo, la certa kondukisto de l' koro erarigata.

Li apartenas al ĉiuj klasoj de l' societo, al malaltaj ofte pro sia naskiĝo, ĉiam pro sia simpla vivmaniero, kaj al plej altaj rondoj pro sia edukiteco intelekta, li superas per la edziĝa vesto de sia animo.

Li estas universalinstruitulo, kiu havas rajton, paroli pri ĉio, kaj ĉiu vole aŭskultas.

Li estas la ponto inter riĉaj kaj malriĉaj; al li donas la riĉulo nenomate la am-oferaĵon, kaj la malriĉuloj hont-antaj akceptas ĝin el *liaj* manoj ne ruĝiĝante.

Tiu ĉi viro estas la pastro!

Li vivas en senedzeco laŭ la parolaĵo de Kristo, ke neniu povas servi du estrojn, kaj li ne volas disigi siajn fortojn inter Dio kaj mondo, inter propra familio kaj la granda familio, transdonata de Dio al li, la komunumo; li volas servi sole sian estron, volas similiĝi kiel eble plej al li, li volas fariĝi partoprenanto je la promesaĵo, ke la gevirguloj ĉien akompanos la Ŝafidon, kaj ke ili kantos kantojn, kiujn neniu alia povas kanti.

Neniu povas fari tiom da bonaĵo ol la pastro! Li estas la buŝo de l' evangelioj, kiujn ĉiam li tenas antaŭ okuloj kaj en koro; kaj la evangelioj respondas ja al ĉiu plendo

kaj ĉiu larmo — tiel la premataj en li trovas la Savanton parolantan, kiu diras al ni: „Kiu vin aŭskultas, min aŭskultas.”

Tial la pastro estas la plej bona amiko de l' homo! —

La kristaneco estas transdonata dumanierè: kiel dogmaro en la altaj vortoj de l' Savinto, kaj kiel historio, kiu rakontas al ni la tervivon, kaj kiel li transdonis al la apostoloj sub la primato de l' Petro sian eklezion kiel universaleklezion por ĉiuj, escepte ĉiu alia dogmaro, tiel kiel estas hodiaŭ kaj estos por ĉiam.

Sur la ŝultroj de l' pastro kuŝas la kristaneco; li estas la radiko ĉiam daŭranta, kiu tiun ĉi arbon, kiu estis plantata en Golgotha, kreskigas en la senfinaĵon; li estas la gardenisto, kiu gardas tiun ĉi arbon kaj ĝin igas senfinajn fruktojn doni, transplantante la plej delikatajn plantetojn en la homajn kordojn, por igi ĉiujn feliĉaj.

Kaj kiel lia dia instruist-majstro, ankaŭ li montras al ni per sia ekzemplo, kiel oni plenumas la diajn ordonojn; ĉar neniam paroloj efikas pli da beno, neniam lingvo plie impresas ol la ekzemplo de la virto.

La pastro estas la homkonanto kaj tial la elektata disdonanto de la donacoj transdonataj al li: la sanktaj sakramentoj kaj almozoj.

Senpage li akceptis, senpage li transdonas ĝin kaj almetas krom tio sian havon.

Kiel la Savinto volis esti alparolata, kiam, irante sur la maro, ŝajne li preteriris; kiel en Emaŭs li volis esti invitata, kiam ŝajne li volis foriri; kiel Dio volas esti petata tiel ankaŭ la pastro nepetite neniam prezentas siajn donojn, ĉar li scias, ke la nesoifanto maldezire rifuzas la plej bonegan trinkaĵon.

La pordo de l' pastro al neniu estas fermata, ĉu riĉulo, ĉu malriĉulo, al li ĉiuj estas infanoj, de la granda familio de l' homaro, ligita per suferado kaj espero.

Nenio lin detenas, nek ventego, nek pluvo, nek varmego, nek malvarmeco, nek infekta malsano, nek propraj suferoj, alporti al mortonta la Savinton.

La pastro penadas, per la malgranda havo de sia kom-

unumo kiel eble plej ornami sian preĝejon — sed kio estas la plej belega preĝejo kompare al la sole inda loĝejo, kiu estas streĉata al la Plejalta en la ĉieltendo, ornata per tiom da oraj steloj!

La plej bela ornamaĵo de la preĝejo estas la bona pastro mem.

La komunumo riverencas arĝentan kalikon samprofunde kiel oran, sed la kor-tiro al la preĝejo kreskas rilate al la amo je la pastro.

La pastro el ĉiuj administrantoj en tero estas la plej turmentata, ĉar li ne unu horon havas por si, sed kiam vesperiĝas, li supreniras la monton kaj legas sian brevieron, kaj kiam la vespersonorilo sonoras, li ekstaras kaj ekrigardas malsupren valon, la amatan vilaĝon, sian komunumon, — kaj li dankas la grandan Patron pro ĉi tiu supertera, feliĉiga profesio.

Kaj kiam oni pense reiras je la longa vivvojo kaj la regiono ĉiam fariĝas pli verda, pli riĉa je floroj, ju pli oni alproksimiĝas al la infaneco, tiam oni kolektas la florojn de la enstinteco al multkolora bukedo de infanec-memoroj por la tagoj de l' maljuneco.

Kaj se post kelkaj jaroj ĉiuj estas mortintaj, la pastro vivis por io, kio estas peninda — ĉar li kolektis por la ĉielo!

Originale de
A. LÜTTWITZ. *)

Esperantigis el la germana
Ad. BRUCKNER.

*) Antaŭa artikolo estas elprenata el la belega kaj tre rekomendinda libro de LÜTTWITZ „Wo ist das Glück?“ Aphorismen. („Kie estas la feliĉo?“ aforismoj), 4-a milo, bindita en tolo, markojn 3.20; Freiburg en Badeno, Herder.

Signoj de Allah.

De univ. prof. D-ro Al. MUSIL.

En la grandioza sablodezerto Nefûd tio okazis. Ni estis kvar viroj. Ni rajdis sur graciaj tendenhavaj rajdokameloj. Vaste ĉirkaŭ ni nenio vivanta ekzistis. Antaŭ kaj post ni

etendiĝis la senfina rozoruĝa maro el sablo kaj eniĝis en la firmamenton superŝutatan de la subiranta suno per purpuro.

Profunda piemo nin okupis. Ni silentis — kiel la tuta nin ĉirkaŭanta naturo. Niaj okuloj estis fiksataj al la okcidenta horizonto, kie la ardanta globo de l' suno preskaŭ tuŝetis la sablon kaj igis ekflami la dezerton en fajro.

„Ho, kiom potenca estas vi, ho Dio!” mallaŭte diris mia akompananto Dalam.

Eĉ riskante, detruis tiun ĉi humoron, mi volis uzi ĝin por miaj etnologiaj studoj, por sciigi pli precize pri liaj religiaj imagoj. La Bedu'oj, sciu, tre evitas paroli pri la plej alta estaĵo, de kies ekzisto ili estas konvinkitaj.

„De kio vi scias, ho Dalam, ke ja ekzistas Dio? Ĉu vi jam vidis lin?”

Dalam nur refoje diris: „Ho, kiom potenca estas vi, ho Allah!” — kaj lasis mian demandon nerespondita.

Ripete mi diris: „Ĉu vi, Dalam, jam vidis Allah'on?”

Dalam silentis.

Jen, sin turnis al mi la maljuna Mikvel rajdanta antaŭ mi kaj diris:

„Ke al vi, ho ŝejh'Mûza, Allah permesu longan vivon! Ĉu mi havas permeson diri peton?”

„Kaj kia estus tiu?”

„Bil-ĥejr, en bono! Preterlasu tiajn demandojn al ni!”

Silentaj ni daŭrigis la rajdadon.

Subite Mikvel haltigas sian rajdokamelon.

„Kio do okazis?” mi scivole demandis.

Mikvel sin klinas antaŭen en sia selo, montras per sia kurba kamelbastono al la sabla ebenaĵo, kaj diras:

„Kion vi vidas tie, ho ŝejho?”

Mi pli precize rigardas la sablan plataĵon, rimarkas kelke da piedimpresoj kaj respondas:

„Tiu estas signoj de strutoj.”

„Ĉu vi jam vidis strutojn en Nefûd?”

„Ne ankoraŭ.”

„De kio vi do scias, ke ja ekzistas strutoj ĉi tie?”

„Tiu ĉi signoj diras ĝin al mi”.

Ho miraklo de Allah! Tiuj ĉi signoj diras al vi, ke strutoj ekzistas, kaj vi kredas ĝin — kaj prava vi estas, ke vi ĝin kredas. Kaj Allah, ĉu li neniam signojn postlasas? Ĉu vi nek antaŭ vi nek post vi vidas ilin? Ĉu vi ne aŭdas ilin en via koro? Kaj Dalam do klarigu al vi, de kio li scias, ke ja ekzistas Dio? Ni Bedu'oj vidas en tuta la dezerto la signojn de Allah, kaj ni scias, ke ĉie li estas kun ni. Kiu ne vidas la signojn de Allah, tiu estas blinda, kaj al li oni ankaŭ ne povas montri ilin, tial ke li ne volas vidi ilin.”

El la germana lingvo tradukis
JOH. SCHRÖDER, Wien.

Noto: La aŭtoro, D-ro Alojzio MUSIL, estas teologia profesoro ĉe la universitato en Wien (Aŭstrio) kaj fame konata esploristo de Arabio. Li kelkfoje travojaĝis la duoninsulon tute sola aŭ kun malmulte da eŭropanaj akompanantoj; li preferis aliĝi al la indiĝenaj gentoj, kies lingvon li perfekte parolas, kaj unu el ili akceptis lin kiel sangamikon. Li travivis multajn danĝerojn kaj sukcesis havigi al si gravajn sciigojn pri la Biblia lando, kiujn li jam publikigis en tre ŝatataj grandaj verkoj, subtenita de la imp. Akademio de Sciencoj en Wien.

Katolikaj Societoj.

Dum la *Sociala Lernado*, ĵus okazinta en Bergamo, Patro CHIAUDANO diktis la jenajn regulojn por la katolikaj societoj:

1-e Nenia asocio aŭ institucio inter katolikoj liĉe¹⁾ povas disiĝi de la katolika religio ĝin ekskludige. Estas evidente, ke nenia asocio povas esti nereligia tiasence, ĉar al neniu, ĉu individue, ĉu asocie, estas permesite rifuzi profesadon de sia religio nek en iaj partoj.

2-e Nenia asocio aŭ institucio inter katolikoj liĉe povas agadi sendepende de la katolika religio ekskludive de ĝia aŭtoritato. Estas korolaro de la unua propono. Ekskludi

¹⁾ Estante diferenco inter *jure, permissum*, kaj *licitum*, mi ne povis ĉiam traduki *licitum* per *rajte* kaj *permesite*, sed mi enkondukis vorton liĉe, kiu estas vere internacia, ĉar latina *licet*, itala *licito*, franca *licite*, hispana *licito*.

pozitive la aŭtoritaton de la katolika Eklezio egalas al la katolikaj asocioj iel rifuzi profesadon de la religio.

3-e Nenia asocio aŭ institucio inter katolikoj liĉe povas ne konsideri religion por konvencio aŭ statutoj, nek fakte kiam ajn, ne konsiderante religion, sur religio mem falas malestimo kaj sur la animoj danĝero, kaj tio precize ĉar ne liĉas malestimigi religion nek animojn danĝeri. Sekve inter katolikoj ĉiuj asocioj aŭ institucioj nereligiaj tiasence, ke oni ne konsideras religion, estas malaprobindaj ĉiufoje, ke de ili oni povas timi malestimon por la Eklezio kaj animan danĝeron por la kristanoj. Kaj tiaj estus, ekzemple, tiuj laboristaj asocioj, sindikatoj, institucioj celantaj la plibonigon de la proletariaro, la protektadon de la rajtoj de la popolo, ne intencante dependi de la principoj de l' katolikismo, de la efiko de la katolika Eklezio. Vere, tiu ĉi kutima sindeteno, tiu sintenado estas kvazaŭ profesio, ke la katolikismo nenion taŭgas aŭ malmulte helpas por la plibonigo de la proletariaro, por alporti la veran feliĉon al la popoloj kaj al la klasoj. Plie per tio oni kutimigas la anojn de la asocio rigardi la Eklezion, ĝiajn principojn, ĝiajn dogmojn, ĝiajn ordonojn kiel senutilaj al la feliĉo ekonomia kaj sociala kaj senigas la anojn de multaj spiritaĵoj helpoj; vidigas al la nekatolikoj, ke katolikoj ne ŝatas sian religion, ĉar ili ne sin turnas al ĝi por vivigaj problemoj. Plie, ne ŝatado de la religio estas skandalo por la bonuloj, al kiuj oni donas spektaklon de homtimo, nefido, malforteco, kio malemigas animojn pri Eklezia aŭtoritato, kies instruojn, admonojn, riproĉojn oni rigardas facile kiel trouzoj de la Eklezia aŭtoritato.

4-e Nenia asocio aŭ institucio inter katolikoj liĉe povas neŝati profesadon de katolika kulto, kiam ajn Diaj aŭ Ekleziaj ordonoj postulas, ke oni sin montru katolika, kaj tio, ĉar ne nur individuoj, sed ankaŭ asocioj mem devas profesadi sian fidon, obei Dion kaj Eklezion. Sekve, kiam Eklezio, uzante sian aŭtoritaton, publikigas leĝojn kaj regulojn por reguligi, direkti, korekti asociojn kaj instituciojn de katolikoj, tiuj ne povas sendependiĝi de tiuj leĝoj kaj reguloj.

Konklude, oni devas nei, ke laboristaj asocioj, celantaj nur la ekonomian plibonigon, povas atingi la celon sen tuŝi problemojn, rilatantajn al la katolika religio.

Do nenia asocia aŭ institucio pozitive povas formeti religion.

(Corriere del Friuli.)

Tradukis BIANCHINI.

Katolika Vivo Ĉiulanda.

Adolfo Kolping kaj lia Verko. (Okaze je lia 100-a naskiĝa Datreveno).

En la mondhistorio ekzistas eminentuloj, kies memoron laŭdas la postnaskiĝintoj, al ili donante honorindan nomon. Ankaŭ Adolf KOLPING, la fondinto de „*Katholischer Gesellenverein*”, estas viro, kies titolo en la historio de katolika vivo ĉiam estos konata, ĉar oni nomas lin nur la „*Gesellenvater*”.¹⁾

De sia morto pasis nun preskaŭ 50 jaroj, sed tamen ne nur ekzistas lia granda, kristana, eminentmaniera kiel sociala, verko, la „*Gesellenverein*”, sed oni ankaŭ ĉiam pli kaj pli komprenas ĝin en ĉiam disvastiĝantaj rondoj, precipe lian personan meriton kaj lian historian signifon. Eĉ en tiu ĉi jaro, la famkonataj komunaj katolikkunvenoj, kiuj okazos dum Aŭgusto en Metz, sin precipmaniere okupos pri tiu ĉi plej sociala viro kaj lia verko. La meritoj de Adolf Kolping estas rekonitaj de ĉiuj, eĉ de nekatolikoj, kaj lia „*Gesellenverein*” (elparolu: Gesellenverajn) glori laŭdas la fondinton en la potenca kreskado. Preskaŭ ĉiuj monataj revuoj kaj tagĵurnaloj raportas pri lia datreveno, kiun oni ne nur festenos en Köln am Rhein, sed ankaŭ en ĉiuj aliaj urboj kaj urbetoj, kie sin troviĝas anoj de tiu ĉi vere katolika unuiĝo.

¹⁾ Mi permesas rimarki al la ŝatata Redakcio kaj gelegantoj, ke estus eble necese trovi bonan vorton por la germana vorto „Geselle”.

La senco de „Geselle” estas viro, kiu dum 3 aŭ 4 jaroj en metia laborejo lernis iu ajn metion, ekzemple de tajloro aŭ bakisto.

Tiu viro laboras sub la ordono de majstro, post la lernjaroj (instrua tempo) li laboras ĉe unu majstro en plej ofte memstara maniero.

Adolf Kolping naskiĝis en Kerpen la 8-an de Decembro 1813, li estis la plej juna filo de malriĉa kamparano. Ni ne volas detale priskribi lian vivon, ĉar ĝi estas tiel riĉa kaj grava, ke mi povas hodiaŭ noti nur la ĉefajn punktojn.

Liberigita de la popola lernejo, li fariĝis ŝuisto, pli ĝuste, li ellernis sub gvido de unu majstro la metion de ŝuisto, dum 3 jaroj. Liajn liberajn momentojn li uzis por sin eduki kaj disvastigi siajn sciojn.

Baldaŭ per propraj okuloj li ekkonis la mizeron de la „Gesellen”. Li mem eksciis, de kiom da danĝeroj estas ĉirkaŭataj tiuj ĉi junaj viroj en religiaj kaj moralaj aferoj. Tial li, post resaniĝo de malsano, intencis studi kaj pastrigi, kvankam li jam havis 24 jarojn. Li energie komencis la studon en la Tertia de Marzella, gimnazio en Köln, de kie post brila abiturio li vizitis la universitaton de München. Post trijara vigla studado li venis en Köln'a pastra seminario.

Bedaŭrinda okazintaĵo lin trafis dum la antaŭvespero de lia pastra konsekrecio: 12-an de Aprilo 1845 mortis lia patro, la patrinon li jam perdis 12-jarojn antaŭe. Post kvar pasintaj jaroj venigis lia ĉefepiskopo J. DE GEISSEL la junan pastron de la provinca urbo en la metropolan urbon, kiu estis pli konvena por efektivigi liajn dezirojn. Por helpi siajn karajn laboristojn en la fizika kaj morala mizero de la metia stato, kiun li ja ekkonis de propra observo.

Sep bonaj, viglaj, karakterplenaj „Gesellen” aliĝis al li kaj kun ili li malfermis je la 15-a de Majo 1849 en malgranda ĉambro de la paroĥa lernejo de St. Columba la „Gesellenverein”, kies taskoj estis, la junajn metiistojn²⁾ eduki por la religio kaj patrujo, precipe ilin perfektigi en komerca stato kaj materiala antaŭeniĝo, fine helpi ilin per konvena mallacigo. Liaj kvar devizoj estis kaj ĝis hodiaŭ

²⁾ La vorto metiisto estas germane *Handwerker*, sed tio esprimone estas por „Geselle”, kiu dum la 3 aŭ 4 jaroj estas lernanto, sed post tiu tempo fariĝas „Geselle”. Bonvolu helpi la gelegantoj trovi rektan kaj mallongan vorton, se eble fundamentan por traduki „Geselle”. Samtempe mi petas pardoni la maltrafan vorton „kunulo”, kiu bedaŭrinde sin trovas sur la rubando de nia standardo.

estas bone konataj inter la loĝantoj kaj vizitantoj; ili estas:

„Religio kaj virto” — „Konsento kaj amo” — „Laboremeco kaj diligenteco” — „Ĝojeco kaj gajeco”.

La sukceso superis ĉiujn atendojn. Ne nur prosperis la unuiĝo de Köln, sed baldaŭ laŭ ekscito de KOLPING stariĝis „Gesellenvereine” en ĉiuj urboj kaj urbetoj, parte sub lia protekto. En la jaro 1851 kuniĝis la diversaj „Gesellenvereine” sub la nomo: „Katholischer Gesellenverein”. En sekvantaj jaroj ni renkontas Ad. Kolping dum longaj kaj lacigaj vojaĝoj, ĉie akceptita kun entuziasmo, kaj li havis la ĝojon vidi la fondon kaj funkciadon de pli ol 400 unuiĝoj en tuta Germanujo kaj Aŭstrio.

Domage la morto forrabis la ĉiam kaj ĉie laborantan Kolping, post multaj vojaĝoj, senfinaj zorgoj kaj la konstruado de Kölner Hospico por liaj amataj „Gesellen”. La malfermo de tiu ĉi domo (plej ofte oni diras simple „Kolpingdomoj”) devis esti lia lasta ĝojo; dek semajnojn poste, la 4an de Decembro 1865, Dio lin vokis ĉielen.

Liajn ostojn estis entombigitaj en Melaten. Tamen la petskribo de estraro de Kölner Gesellenverein al lia reĝa moŝto Vilhelmo I-a havis la resultaton, ke estis transportita la ostrestaĵo de Kolping la 30-an de Aprilo 1866 en la minorita preĝejo, kie ĝi nun ripozas antaŭ la altaro de S-ta Josefo, la ĉefan patronon de Gesellenverein. Simpla plataĵo el nigra marmoro nun kovras lian tombon. La surskribo de li mem verkita kaj dezirita estas: „Tie ĉi ripozas Adolf Kolping, naskita 8. XII. 1813 en Kerpen; mortita 4. XII. 1865 en Köln; li petas la almozon de l' preĝo”.

Tie ĉi oni ĉiutage trovos kliniĝante kaj preĝante „Gesellen” por danki Dion, ke li donacis en mizera tempo al la laboristoj Ad. Kolping, kaj por danki Kolping, kiu kreis per sennombraj penadoj la Gesellenverein kaj domojn. Ili bone scias kaj sentas, ke li zorgis kiel patro kaj liaj filaj, la „Gesellen”, eterne ne forgesos Adolf Kolping kaj lian ĉiam kreskantan verkon. Kun ili ĉiuj veraj amikoj de sociala kaj morala popoleduko laŭdas la plej faman viron de 19a jarcento. Eĉ la protestantoj fondis la Gesellenverein tute simila al la Kolpinga.

Adolf Kolping verkis multajn librojn kaj donis al la Gesellen orajn vortojn kaj instruojn. Ne estas eble en tiu ĉi artikolo doni sufiĉe bonajn klarigojn pri la benoj de tiu ĉi (ankaŭ en nia epoko) absolute necesa institucio. Se estos dezirata, ni raportus de tempo al tempo en tiu ĉi ĵurnalo.

Nur permesu, ke ni el la „*Kolpingsblatt*” t.e. ĉiusemajna gazeto por la membroj de Gesellenverein, atentigu vin pri la disvastigado de tiu ĉi vasta unuiĝo.

Nuntempe ekzistas *1221 unuiĝoj*.

921 en Germanujo, 166 en Aŭstrio, 77 en Hungarujo, 34 en Svisujo, po 7 en Nederlando kaj Usono, 9 en aliaj landoj.

79342 aktivaj membroj.

66742 en Germanujo, 12218 en Aŭstrio, 2011 en Svisujo 2660 en Nederlando kaj Usono 711 en aliaj landoj.

131624 eksterordinaraj membroj.

En la jaro 1910 aliĝis 22647 aktivaj membroj.

Religia instruo kaj komuna akcepto de Sanktaj Sakramentoj.

Instruo. Dum la jaro 1910 okazis 875 kursoj kun 13815 partoprenantoj en 498 unuiĝoj.

Faka instruo, kun praktika laboro en pli grandaj unuiĝoj; 276 kursoj por ĉiuj metioj en 6340 unuiĝoj.

Preparantaj kursoj okazis en 81 unuiĝoj; la membroj estos ekzamenataj kaj ricevos poste ateston de majstro kun rajto memstare labori. 1187 membroj faris kun sukceso la ekzamenon de majstro en jaro 1910.

Hospicoj (propraj domoj en kiuj la membroj povas loĝi, manĝi, ludi, lerni, eĉ amuziĝi k. t. p.) ekzistas 380 kun 5600 loĝantoj.

Subtenoj dum la migradoj de membroj; la unuiĝo elspezis 70105 Markojn kaj donis ŝenpagan restejon dum 96068 noktoj.

Ŝparejo de unuiĝo en 670 unuiĝoj kun jarenmetoj de 2335365 Markoj, restaĵo 6296824 Markoj.

Kaso por helpi dum malsano kaj por la entombigo.

Kunvenoj kun instruaj paroladoj en 844 unuiĝoj semajne

en 220 unuiĝoj dufoje dum monato, en 151 unuiĝoj dufoje dum monato. Entute en la jaro 1910 estis 49500 tiaj kunvenoj.

Fako por la gimnastiko; ekzistas 197 kun 4633 membroj *Organo de Unuiĝo* estas *Kolpingsblatt*, eldono de 55000 ekzempleroj semajne, aperanta kun „la Gesellenfreund” (t. e. „Gesellen”-amiko), enhavante ankaŭ anoncojn por trovi laboron.

Funkciado de Gesellenverein.

Ĝenerala prezido: Ĝeneral-prezidanto Mons. SCHWEITZER, Köln, Helenenstrasse 11.

Ĝenerala sekretario: Kolpingsblatt kaj kaso: Köln, Norbertstrasse 12.

* *
* *
*

El tiuj ĉi klarigoj facile kaj bone oni rimarkis, ke tiu ĉi institucio estas vere katolika kaj tial ĝi postulas nian atenton, ĉar tiu ĉi Gesellenverein ne estas kreita nur por germanoj, sed por ĉiuj gentoj de l' mondo. Kiam iris Adolf Kolping Aŭstrion, li forlasis la opinion, ke la Gesellenverein estas nur por germanoj, kiun opinion mi bedaŭrinde de niaj I.K.U.E.-kongresanoj mem aŭdis, ĉar oni ofte nomas la „Gesellenhaus” en eksterlando „germana domo”. Ho tute ne, la starigo de novaj domoj en eksterlando ne celas esti rifuĝejo por la migrantoj, sed kunigi kiel la zorgema eklezio la laboristojn en bonajn domojn. Baldaŭ venos la tempo kun helpo de nia kara lingvo forigi tiujn tute malĝustajn opiniojn, ĉar en Vien oni sin okupas de post unu jaro en „Verda Stelo” por propagandi nian lingvon. Multaj jam vizitis niajn kursojn kaj forvojaĝante de Vieno ili certe propagandos Esperanton en la de ili vizitotaj unuiĝoj. Jam en Zürich, Stuttgart, Düsseldorf, Dresden, Plaŭen, München estas niaj samideanoj kaj ni senlace semos inter niaj membroj la helplingvon Esperanton. El tio sekvas, se ekzemple Nederlandano aliĝu al nia „Gesellenverein”, ke li facile povas viziti Köln, Frankfurt, Nürnberg, München, Salzburg, Linz, Wien, Venedig, Rom, Paris, Londoe k. t. p.; li tiamaniere lernas labori laŭ fremdlandaj metodoj kaj facile li ankaŭ lernas aliajn lingvojn, sed la ĉefa celo estos atingata:

amikiĝi kaj konatiĝi kun fremdnacia laboristo pro la facila interkompreniĝo per Esperanto. Ni jam multe aŭdis, ke Nederlando havas tiel multe da esperantistaj laboristoj, nun, venu eksterlanden per la helpo de Gesellenverein; tie vi trovos samreligianojn, eĉ nekatolikojn, ĉiuj animitaj per la ideo de Adolf Kolping. Venu, por ke ankaŭ niaj membroj vidu, ke estas necese lerni nian lingvon. Estu apostoloj de nia lingvo kaj vi solvos ankaŭ la demandon socialan inter la laboristoj. Por tion ĉi efektiviĝi estu skribitaj tiuj vortoj kaj ili estu finitaj per la saluto de KOLPING al siaj Gesellen: „Dio benu la honestan metion!”

Benito ULM.

LIA MOŝTO KARDINALO VILHELMO VAN ROSSUM EN NEDERLANDO.

Granda ĝojo regas inter la Katolikoj nederlandaj; ne-priskribeblan entuziasmon oni ĉie en la tuta lando renkontas. Nederlando havas la grandan feliĉon ricevi la viziton de Princo de l' Eklezio, kiu benante iras de urbo al urbo kiel sendito kaj riprezentanto de Lia Papa Moŝto Pio X.

Nederlando estas fieraj kaj ĝi esprimas tiun fierecon brilmaniere. Ĝi havas kialon por esti fieraj: unu el ĝiaj grandaj filoj, nobligita per la alta rango de Kardinalo, venis ĉi-tien kiel obeema plenumanto de la ordonoj papaj, iri Nederlandon, kiu rajtas vidi kaj honori ĝian Kardinalon!

Kvar longdaŭraj centjaroj pasis, dum kiuj Nederlando ne estis riprezentata en la Sankta Kolegio. De post la dekseca centjaro, kiam la famkonata Nederlandano Papo Adriano VI regis la Sanktan Eklezion kaj unu el miaj samprovincanoj Vilhelmo Van Enckevoirt, plenumis la altoficon Kardinalan, la malgranda, tiel malmulte konata lando al la maro ne plu havis la privilegion, posedi propran Kardinalon. Nuntempe tamen, antaŭ du jaroj, Lia Papa Moŝto denove elektis unu el niaj samlandanoj por tiu alta rango kaj ne estas tro kuraĝega pretendi, ke la Sankta Patro per tio samtempe volis doni rekompencan al la katolikoj nederlandaj, kiuj en la malfacila batalo pro sia sankta

religio neniam nefideliĝis la Eklezion, sed per starema, decida, konstanta fideleco al Papo kaj Eklezio, en kiu ili trovis la fortojn por siaj malfacilaj penadoj, sukcesis doni al la Katolika Eklezio en nia patrujo novan, grandan prosperon.

Malfacilajn tempojn Nederlando travivis kaŭze de la religiaj disputoj kaj persekutadoj. Ĝiajn preĝejojn oni rabadis kaj ruinigis, ĝiajn pastrojn oni ofendis, turmentigis kaj mortigis, kaj sufiĉis esti nur katoliko por endanĝeriĝi al la plej grandaj persekutadoj.

Nova, bela aŭroro tamen fine eklumis en la multe suferinta Nederlando — la religia libereco estis al ĝi redonita kaj per tio la ebleco de nova firma starigado de la Katolika Eklezio en nia lando.

Feliĉe ekmontriĝis, ke la katolika Kredo ne estis malaperinta en la koroj de nia popolo; baldaŭ ĝi denove disradiis ĝian brilan lumon, la episkoplandoj estis reorganizitaj kaj nun Nederlando denove kuraĝas fiere sin montri al la katolika mondo. Ĉieloke oni restarigis la preĝejojn kaj katedralojn en nova belegeco; ĉieloke oni fondis katolikajn instituciojn de bonfarado; miloj da pastroj kaj monaĥoj sin dediĉas al la sankta laboro por la gloro de Dio, la savo kaj feliĉego de l' homoj; la filoj kaj filinoj nederlandaj trairas la tutan mondon por prediki la veran Kredon kaj montri al niaj malfeliĉaj, erarantaj samkredituloj la nuran vojon al la Vereco. Nenie, eble, la principe Katolikaj societoj tiel rave prosperadas kiel en nia lando. Ne pli fidelaj infanoj de la Papo ol la nederlandaj Katolikoj, ne pli sinceraj, pli veremaj, anoj de la Sankta Eklezio ol la longtempe subpremitaj, sed nun liberigitaj katolikoj de la „malaltaj landoj al la maro”!

Estas, kvazaŭ ili nun volas kompensi Romon tion, kion ili tiel longtempe ne povis doni, kaj, liberigitaj de la premantaj ligiloj de l' subpremo, ili nun sentas la bezonon, entuziasme pruvi, ke ili restis fidelaj al la Kredo de l' praavoj. Ho, kiel feliĉaj estas la katolikoj nederlandaj, aŭdi de ilia Kardinalo, ke Lia Papa Moŝto estas tiel ege kontenta pri la agado de Siaj holandaj infanoj! Kaj, se ili

nun donas honoron, grandan honoron al Lia Kardinala Moŝto Van Rossum, estas tio precipe la rezulto de ilia kora alligiteco kaj amo je la Papo, kiun honoro ili volas en Lia riprezentanto. Tamen, tiu honorado ankaŭ parte devenas el nacia fiereco.

Nacia fiereco! Jes, Nederlando povas esti fiera je ĉi-tiu, sia humila filo, kiun Lia Papa Moŝto mem okaze de lia Kardinalelekto nomis: imitindan monaĥon, sanktan pastron, kleran teologon, fortan subtenanton de la Eklezio, kaj de kiu Li antaŭdiris, ke li estus „una stella fulgidissima” brilanta stelo, en la Sankta Kolegio de Kardinaloj.

„Honos praemium virtutis, diris Cicero. Jes, la granda honoro, kiun la Papo nian Kardinalon donis, estas tiel multe meritita rekompenco de liaj grandaj, ekzemplaj virttoj. Lia granda laboremece kaj memofero por Dio kaj Lia Eklezio havigis Lin la specialan amon de nia Sankta Patro, Kiu tiun amon multfoje montris per grandaj distingajtoj.

Kie ajn Lia Kardinala Moŝto VAN ROSSUM venis, li tuj venkis la korojn de ĉiuj. Kiu el ni iam forgesos la grandegajn, brilegajn respekt-kaj estimatestojn, kiujn Lia Kardinala Moŝto ricevis, kiam Li kiel Papsendito ĉeestis la Vienan Eŭkaristian Kongreson, kiu restos unu el la brilaj en la historio de la Eklezio?

La brileco de la imperia akcepto en Vieno eble mankis ĉi-tie, la sincera koreco, kun kiu la Nederlandanoj glore ricevis sian Kardinalon, tamen certe ne estis malpli granda. Tuta Katolika Nederlando, verdire, partoprenis en la brila honorado de sia Kardinalo.

Kie ajn Lia Moŝto alvenis, ĉu en urbo aŭ vilaĝo, ĉu en la liberala kaj socialista Amsterdamo kaj Rotterdamo aŭ en la katolika 's-Hertogenbosch, ĉie oni salutis Lin kun nepriskribebla entuziasmo kaj ne nur katolikoj sed ankaŭ, alireligianoj partoprenis al tiuj honormanifestadoj. Eĉ liberalaj gazetoj honoris Lin per artikoloj.

En Amsterdamo komencis la triumfvojaĝo meze de dek-miloj, kiuj staris laŭlonge la stratoj. Imponantaj religiaj ceremonioj okazis en la preĝejoj; en elokventaj vortoj,

kiuj atestis grandan respektigon kaj atestimon, la eminentularo de la nederlandaj katolikaj pioniroj laŭdegis Lin kaj en kortuŝantaj vortoj la Kardinalo dankis pro la honoro, kiun Li akcepti volis kiel fidelecesprimo je Lia Papa Moŝto. Li instigis la Katolikojn ĉiam agadi laŭ la vortoj de Papo kaj Episkopoj. Dum la aŭdiencoj ni vidis kunvenintaj la ĉefajn aŭtoritatojn religiajn, registrarajn, militistajn kaj civilajn. Ŝia Moŝto Reĝino VILHELMINO ricevis la Kardinalon en Sia palaco en Hago, kien Ŝi speciale vojaĝis el sia somerpalaco en Apeldoorn, kaj Ŝi donis al Li la plej altan ordenon, kiun Ŝi doni povis: la grandkrucon de la ordeno de la Nederlanda Leono. Ankaŭ Ŝia Moŝto la Reĝino Vidvino ricevis la Kardinalon afablege en Sia palaco en Soestdijk.

Ne estas eble priskribi, eĉ nur mallonge, la brilan triumfvojaĝon de la Kardinalo tra nia lando. Post Amsterdam venis Rotterdam, Roosendaal, Tilburg kaj fine 's-Hertogenbosch.

's-Hertogenbosch — la fokuso de la katolika vivo en Nederlando! Nek Reĝo nek Reĝino povis fari pli gloran eniron en nia urbo aŭ renkonti pli grandan entuziasmon. Dekmiloj kaj denove dekmiloj urbanoj kaj provincoj staris laŭlonge la stratoj. Ĉiuj katolikaj societoj kun standardoj kaj flagoj akompanis la Kardinalon procesimaniere al la Katedralo, kie la kanonikaro kaj la reprezentanto de nia maljuna Episkopo Lin ricevis kaj honoris.

Vespere mi vidis la Kardinalon en la preĝejo de l' Pastroj Redemptoristoj. Ho, mi ne povas diri kiaj sentoj min atakegis en tiu momento, kiam tiu humila, kaj tamen tiel fiero, princa figuro, tiu sankta pastro, kiel la Papo diris, tiel pie iris altaron benante la fidelulojn. Estis kvazaŭ mi denove staris en la grandega S. Pedro basiliko en Romo kaj kvazaŭ mi vidis benante alproksimiĝi la Sanktan Patron, kiam ankaŭ, kiel nun, devigita per mistera forto eĉ senvole mi ĝenufleksis por ricevi la benadon.

Ho, religio! Kiel belega, kiel rava vi estas, ke vi povas vekti tiajn emociojn! Jes, en tiuj momentoj oni ekkomprenas kiel feliĉaj ni estas, havi la nuran, veran Kredon...

Kvar tagojn Lia Kardinala Moŝto restis en nia urbo kaj vizitis diversajn instituciojn ĉi-tie kaj en la ĉirkaŭaĵo.

Brilan honorofeston aranĝis la militistaro, al kiu partoprenis ankaŭ la militistaj aŭtoritatoj, eĉ la ne-katolikaj. Tre imponanta kantado de 5000 infanoj okazis antaŭ la palaco episkopa, kie la Kardinalo kaj la tuta pastraro de la urbo kaj la kanonikaro tagmanĝis.

La Kardinalo foriris nur, sed la triumfvojaĝo daŭrigas... Kuilenburg, Utreĥto, Zwolle, Roermond, Venlo, Wittem, Maastricht, Aken, Belgujo... Senfina vojaĝo, dum kiu la Kardinalo ricevos ankoraŭ multe da pruvoj de amo kaj fideleco.

Nederlando inde ricevis ĝian grandan filon Lia Kardinala Moŝto povas esti kontenta pri la alligiteco de la nederlandaj Katolikoj montrita je Romo.

*
* * *

Mi ne bezonas diri, ke la nederlandaj Katolikaj Esperantistoj partoprenis al la festoj honore de la nederlanda Kardinalo. Se ni havas por tio la samajn motivojn kiel ĉiuj aliaj Katolikoj nederlandaj, ni havas ankoraŭ unu plue, ĉar Kardinalo van Rossum sin montris tre simpatia je nia Katolika Esperantista movado. En niaj malfacilaj penadoj por anstataŭigi la indiferencon de niaj samreligianoj per vera interesiĝo, ni ricevis grandan helpon en Lia decida rekomendo kaj Lia jesigo de la granda utileco de Esperanto por la Katolika Eklezio.

La nederlandaj Katolikaj Esperantistoj komprenis, ke ili havis devon je la Kardinalo, devon de dankemeco. Ili plenumis tiun devon. Jam okaze de Lia alveno en Amsterdamo la grupo „Nia Kredo” salutis la Kardinalon en la nomo de la Katolika Esperantistaro; en la kunveno de la Esperantotago Tilburga oni publike laŭdegis Lin kaj dum Lia glora eniro en 's-Hertogenbosch, la Esp. grupo de tiu urbo kaj kelkaj delegitoj de la ĉefestraro kaj de aliaj grupoj marŝis, antaŭita de la standardo de nia ligo kaj la Esp. flago, en la procesio, kiu akompanis la Kardinalon preĝejon. Plezure mi povas komuniki, ke la Kardinalo speciale atentis nian grupon, kiu ankaŭ estis la plej mult-

nombra. La tagon de Lia alveno „Nederlanda Katoliko” oferigis al la Kardinalo, je la iniciativo de nia grupo, nome de la tuta katolika Esperantistaro nederlanda, belegan kaj grandvaloran bukedon, kiu dankeme estis akceptita.

La sekvintan tagon ankaŭ deputataro de la Esperantistoj vizitis la aŭdiencon de la Kardinalo. Estis la ĉefestraranoj S-roj Kapitano VAN ERP kaj H. B. VAN ZWET, la religia konsilanto de la grupo de 's-Hertogenbosch Pastro J. DE KROON, la sekretariino S-ino RAS VAN DEN EERENBEEMT kaj la prezidanto S-ro J. PASTOOR. Volonte ni estus alparolintaj lian Kardinalan Moŝton por danki Lin kaj peti Lian benon por nia movado, tamen ankoraŭ 600 personoj atendis por esti ricevataj! Tial ni ne povis lacigi Lin. Niaj floroj tamen, al kiuj oni donis la plej bonan lokon en la aŭdienco-ĉambrego kaj kiuj superis ĉiujn aliajn, sendube sufiĉe interpretos al nia Kardinalo niajn sentojn de dankemeco.

's-Hertogenbosch, la 25-an de Julio.

P.

Kroniko de I.K.U.E.

Oficialaj Sciigoj de la „Aŭstria Katolika Ligo Esperantista”.

Dum la pentekosto aperis la jam senpacience atendita agitadfolio de nia „A.K.L.E.” La vizaĝflanko enhavas malgrandan pritrakton pri la temo „Kial estas devo de Katolikoj, ke ili Esperanton subtenu?” La 1-a alineo (ĉapitetro sen superskribaĵo) priparolas la grandegan utilon de nia mondlingvo por komerco, scienco kaj kongresoj, precipe en Aŭstrio kun ĝiaj 10 lingvoj. La 2-a alineo montras la danĝeron, minacantan la katolikaron, se tiun-ĉi valoran helpilon la framasonaro kaj judaro fi-uzas kontraŭ la eklizio, kiel jam estas uzataj gazetaro kaj monegaro. La 3-a alineo diras, ke la okupado per Esperanto ne detiras multajn fervorajn laborantojn de aliaj gravaj naciaj unuiĝoj. Malsupre estas la adreso de la „A.K.L.E.” kun telefona kaj poŝtsparkasa numero, rezervita placo por loka grupo kaj prezoj por vendo de la flugfolioj, se oni aĉetas pli grandan

nombron. Sur la dorsflanko de la propagandfolio instruas artikoleto pri la propagandmaniero en 10 punktoj.

La laboroj ĉiam progresas, kvankam la malmultaj laborantoj nur tre malfacile trovas tempon. Ĉar jam kelkaj anoj plendis pri longa nerespondo al iliaj leteroj aŭ karto, ni devas tie-ĉi nun klarigi, ke la ligestraranoj siajn laborojn nur povas fari en siaj libertempoj. Krom tio ni ĉiuj (esceptinte S-ro ULM, kiu laboras *nur* por Esperanto) jam estas treege okupitaj en aliaj unuiĝoj precipe koncerne sociajn reformaferojn tiel, ke ni nur devas ŝteli tempon por Esperanto. Tamen ni akceptis tiujn ĉi laborojn rigardante la gravecon de Esperanto por la katolikaro. Bonvolu do indulge senkulpigi, se eble ankaŭ estontece nia „ligo” ne ĉiam funkcias rapide kiel aŭtomato, elpuŝanta la deziritan aĵon tiuj post la enĵeto de la mono.

Nia kaso ankaŭ ne permesis ĝis nun ampleksan laboron, ĉar ni devis unue kolekti 100 K. por poŝtsparkasa konto kaj aĉeti kelkan tre necesan ilaĵon ekzemple leterpaperon, poŝtmarkojn, unuiĝlibrojn, lernlibrojn k. t. p. kaj eĉ tiun ĉi sumon ni neeble estus gajnintaj, se kelkaj membroj ne estus pruntintaj pli ol 200 K. kaj ofereme donacintaj pli ol 150 K.

Jen la mallongigita resumo pri la ĝisnuna stato de nia liga kaso:

stampimposto	2.5 K.	kotizoj	60 K.
kongres nomtabulo	9 „	3 donacoj * à 4 K.	12 „
stampilo k. kus.	2 „	sortimenta vendo	120 „
leterpapero	4 „	kurso ** de	
kuvertoj	1.5 „	S-ro Schröder	38 „
poŝtelspezoj	8 „	kurso de S-ro Hörl	31 „
kaslibro k.t.p.	3 „	* * * „ S-ro Wesely	25 „
pagiloj k.t.p.	5 „	* * *	40 „
sortimenteto	100 „	aliaj gajnoj	10 „
„ŝlosiloj” (à 10 h.)	15 „	sumo de enspezoj :	336 K.
halo por parolado	20 „		
invitoj por	16 „		
agitadfolioj	42 „		
poŝtspark. konto	100 „		
sumo de elspezoj :	328 K.		

*) S-ro kortega konsil. JUNGWIRTH, redaktoro SCHRÖDER, Rev. pastro OTT.

***) La kursgvidantoj faris la kursojn *tute* senpage kaj donacis la enspezojn al la A.K.L.E.

Oni do vidas, ke nia ligo tre grave devas labori, por ke ĝi povu esti en normala ordo. Sed dankon al Dio! Ni jam estas nun en financa ordo kaj en la nova jaro ni jam povos pli facile labori, ĉar la regulaj enspezoj t. e. kotizoj nur povos esti uzataj por agitado.

Belan sukceson havas jam Esperanto en la kat. junulinaro, kies 1 kuniĝejo estas en la XVIII distrikto, Plenergasse 10. Tie gvidas S-ino DE KUBIN, fervora helpantino de nia afero, kurson por junulinoj, kiun partoprenas 15 membrinoj tre diligente kaj persisteme. La kursestrino ekzemple proponis dum la someraj monatoj interrompi la kurson, sed la membrinoj ne konsentis tion. Ses de ili eĉ decidis, fondi novan esperantan grupon kaj aligi al A. K. L. E. — Bravege!

Tiu ĉi agema voĵfarantino ankaŭ jam provis en „gardanĝela ligo”, ligo por infanoj kontraŭ alkoholismo semi esperantojn grajnoj. Se oni nur havus bonan kaj malkaran lernlibron por la infanoj, oni jam en aŭtuno povus komenci tiun ĉi kamparon kulturigi.

En la „katolika helpistunuiĝo” (Kathol. Gesellenverein) VI. Gumpendorferstrasse 39, komencis la kasisto de tiea esp. grupo „verda stelo” novan kurson kun 22 lernemuloj, inter kiuj estas reprezentita krom la germana lingvo ankaŭ la hungara kaj kroata.

Pri aliaj okazintaĵoj, kursoj k. t. p. bonvolu Vi envidi la antaŭajn numerojn de „E. K.”. Novaĵo estas, ke la dufojaj kunvenoj en la hotelo Holzwarth Mariahilfer strato 156 ne plu sufiĉis. La katolikaj Esperantistoj de post Junio kunvenos *ĉiusabate post la oka*. Se do iu gasto venos Vienon, certe li trovos sabaton Esperantiston.

Fervora samideanino nin surprizis per valora donaco: ŝi brodis beletan silkan flageton kun ora surskribaĵo. Tiu ĉi agitadilo la publikon tre sukcese atentigos.

En Mies (Bohemio) nia diligenta anino T. HARLASS interesigis la tiean monaĥinejon por Esperanto.

En Graz (ĉefurbo de Stirio) kelkaj katolikoj preparolis la fondon de katolika grupo, por pli komprenigi la valoron

de la mondlingvo en katolikaj rondoj. Ĵurnalisto, sekretario de 'l abstinencunuiĝo, du universitatstudentoj kaj eĉ la fama universitatprofesoro D-ro UDE komencis antaŭlaborojn, por ekagitadi en la aŭtuno per paroladoj kaj kursoj.

Karaj gesamideanoj! Ĉe la IV-a kongreso en Romo ankaŭ A.K.L.E. devos esti oficiale reprezentata almenaŭ per unu estrarmembro. Ĉar kelkaj ne povos partopreni pro malriĉo kaj ĉar ankaŭ nia ligo en la kaso nur havas 5—6 K., tial ni petas niajn gesamideanojn ensendi laŭvole kaj laŭforte monkotizaĵojn por subteni iomete nian delegiton. Ni kvitancos la donacojn per seperata poŝtkarto.

Josef HÖRL,
Sekretario.

Karlo WESELY,
Kasisto.

Benito ULM.
Vic-prezidanto.

Katolika Esperanta Grupo en Nice.

De la novembra monato 1912-a, Katolika Esperanta Grupo stariĝis en Nice. Tiu Grupo, fondita kun la aprobo de Lia Episkopa Moŝto, Monsinjoro la Episkopo de Nice, kvankam tiel juna, tre bone funkcias. Ĝi havas sian sidejon ĉe Paroĥo Notre Dame; ĝiaj du semajnaj kursoj estas tre fervore sekvataj. Plie, la Nicea Katolika Esperanta Grupo organizis ĉiusemajne ses aliajn kursojn en liberaj lernejoj kaj aŭspicioj. Tiamaniere pli ol cent infanoj scias la lingvon Esperanto.

La dimanĉon 6-a de Aprilo 1913-a, Esperanta religia ceremonio okazis en la preĝejo Notre Dame. La 150 ĉeestantoj plezurege aŭdis la „Boys-Scouts” kantantajn „Ni volas Dion” kaj, pie aŭskultis la Esperantan predikon de abato DOL, laŭ la jena teksto „Amu vin unu la alian”.

La organizintoj de la Nicea Esperanta Katolika Grupo, kontentegaj kaj fieraj, nur deziras, ke ĉiu urbo tre baldaŭ havu sian Katolikan Esperantan Grupon.

Bona afero por Esperanto kaj Katolikismo. .

F-ino A. CAUVIN, Sekretariino
de la Nicea Katolika Esperanta Grupo
1 rue Alphonse Karr

Nice (Francujo).

Esperanto-Tago en Tilburg (Nederlando).

Dimanĉon 6 Julio „Nederlanda Katoliko” organizis regionan Esperanto-tagon en Tilburg. Kvankam estas ordinara afero, ke Esperanta manifestado bone sukcesas, tamen ni devas speciale mencii la sukceson de tiu-ĉi tago, kiu estis tiel granda, ke ĝi superis ĉies atendojn. Vere, por ni, Esperantistoj, mem estis surprizo konstati la influon, kiun jam havas la vorto „Esperanto” sur la homoj. Ni mem mirigitaj konstatis la grandajn paŝojn, kiujn faris Esperanto antaŭen. Ĉar neniam antaŭe en Nederlando tia amaso da Esperantistoj, interesiĝantaj kaj scivolemaj estis vidata, eĉ ne dum „Nia Dua” en Hago, kiu tamen tiel bonege sukcesis. Kiam hodiaŭ post nur du jaroj okazus katolika internacia kongreso en Nederlando, tiam „Nia Dua” estus nur ombro kompare al la hodiaŭa kongreso, tiel rilate al la nombro da partoprenantoj, kiel rilate al la serioza interesiĝo de la publiko kaj de la gazetaro, kiu nuntempe en nia lando ĝenerale konsideras Esperanton nepra fakto kaj vivanta movado.

Kvankam multaj nekatolikaj gastoj ĉeestis, la karaktero de tiu Tilburg’a Esperanto-tago estis tute katolika; sur ĉio oni metis bone videblan, aŭ almenaŭ senteblan, stampilon de katolikeco. Matene, dum la S-ta Meso kun prediko farita de la prezidanto de „Nederlanda Katoliko”, Pastro POELL, la preĝejo estis tro malgranda, multaj starante ĉeestis la diservon. Meztage, dum la salutkunveno, la tre granda kunvenejo denove estis tro malgranda. Tuj poste, dum la tagmanĝo, la kunmanĝantoj estis tiel grandnombraj, ke apenaŭ ili povis trovi lokon al la festtablo. Post la tagmanĝo oni vizitis la rimarkindan ekspozicion, okazantan tiun-ĉi jaron en Tilburg, kaj sole la komitato de la Esp. tago vendis pli ol 600 enirkartojn por Esperantistoj. Je la sesa vespere okazis la granda propaganda kunveno en la vasta kaj ampleksa kunvenejo de la ekspozicio, kaj spite tio la salonego estis plenplena. Je la komenco de la kunveno mi taksis la nombron de la ĉeestintoj je proksimume 1200. La mirigitaj Esperantistoj mem miris pri tia neat-

dita sukceso de simpla Esperanto-tago. La komitato de la ekspozicio devis konfesi, ke la Esperanto-tago altiris tiom da vizitantoj de la ekspozicio, ke nia Esperanto-tago estis samtempe la ĝis tiam plej bone vizitita ekspozicia-tago.

Grava afero. — Dum la propagandkunveno parolis (krom P-ro Linnebank kaj F-ino van Griensven) unualoke S-ro Janssen pri „La Katolikoj kaj la Gazetaro”, temo, kiu pli detale estos pritraktata kaj pridiskutata dum „Nia Kvara” en Romo (vidu „oficialajn sciigojn” en tiu-ĉi numero). La parolado faris grandan impreson. Vere, la afero meritas la atenton kaj apogon de ĉiuj veraj Katolikoj. Ĝi ankaŭ estas priparolata en la „Alvoko al la Katolikoj tutmondaj”, trovebla ĉi sube. Multaj eble dubos, ĉu povu sukcesi tia entrepreno. Sed oni pripensu kaj konsideru, ke tia entrepreno estas nepre *necesa* por ni, Katolikoj, kaj ke ĝia starigo nur dependas de komencita kunlaboro kaj persista volo de la tutmonda katolikaro. — Ne pli honta viktimo ol viktimo pro propra kulpo. Kaj tuj post kiam la Katolikaro havis iam la eblon, por almenaŭ klopodi, ke stariĝu entrepreno, kiu uzas la samajn rimedojn, kiujn uzas la potenca nekatolika kaj tendenca gazetaro, por malhoneste superi la katolikajn kaj honestajn gazetojn — kaj ili, spite tiu eblo, tamen rifuzas doni apogon kaj helpon, tiel, ke tiu pestinfekta gazetaro senbariere povos daŭrigi, malsanigi kaj veneni la spiriton de la popolamaso — tuj post tiu rifuzo aŭ neebligo per indiferenteco, la viktimateco de la katolikaro per la sendia gazetaro fariĝas viktimateco ne tute sen propra kulpo, kaj la indigno niaflanke kaj la kompato de la flanko de honestuloj devos tuj esti anstataŭata de konscienciproĉo niaflanke kaj de malestimo de la flanko de aliaj. Kiu volas atingi la celon, tiu uzu la rimedojn, tuj post kiam tiuj-ĉi prezentiĝas.

Ĉar tiu entrepreno krom naciajn lingvojn ankaŭ uzos Esperanton kiel komunikilon, pro tio por ni, katolikaj Esperantistoj, ekzistas nova motivo por ĉiuforte apogi ĝin. La servoj estos reciprokaj: Esperanto multege plifaciligos la funkciadon de tia entrepreno, kaj reciproke tia entrepreno, uzante ankaŭ Esperanton por siaj korespondoj,

multege plifaciligos la disvastigon de Esperanto kaj de I. K. U. E. Mi scias, ke la projekto estas bonege antaŭ-preparita, ke jam gravaj laboroj estas antaŭfaritaj: ne estas ekpenŝaĵo de momenta entuziasmo, sed serioze pripensita kaj de longe preparita projekto, kiun oni proponos kaj klopodos efektiviĝi, nome: la starigo de iom-post-iom komplete funkcia *internacia telegrafagentejo*, komencante per internaciigo de la jam de post du jaroj bone funkcia kaj, por la katolika afero, utilega „Katolika Mondkorespondado” en München.

Sekretario de la Organiza Komitato estas S-ro P. JANSSEN, Nieuwendijk 183, Amsterdam (Nederlando). Oni turnu sin al tiu ĉi adreso (*ne al mi!*) por informoj kaj partopreno k.t.p. Dr. SMULDERS.

Internacia Telegraf-Agentejo.

Ni publikigas suban cirkuleron, dissenditan al multaj Katolikoj tra la tuta mondo, petante atenti mian antaŭan artikolon. D-ro S.

Alvoko al la Katolikoj tutmondaj.

Malvero kaj kalumnio, sugestitaj de malamego kontraŭ la katolika eklezio, ĝiaj pastroj kaj anoj, nune festas siajn plej facilajn triumfojn.

Kiel ondo de la aermaro fluas ĉia pripastra kalumnio, ĉia „monaĥeja skandalo”, ĉia antiklerikala agado tra ĉiuj landoj, postlasante malfervoron, dubon kaj malamon. Diverslande kaj diversmaniere niaj kontraŭuloj estas bone organizitaj *internacie*.

Nia Sankta Patro, Lia Papa Moŝto, Pio X, estis do prava, kiam Li diris: „Kio utilas konstrui ekleziojn, aranĝi misiojn, starigi lernejojn; ĉiaj bonaj laboroj, ĉiaj penadoj de Katolikoj restas senfruktaj, se ili ne same komprenas ĝuste servi al si la defendajn kaj atakajn batalilojn de la katolika gazetaro”.

Kion ni bezonas, eĉ urĝe bezonas, estas katolika raport-informejo, disvastigata tra la tuta mondo. Do internacian

katolikan kontraŭbatalan kaj klarigan institucion ni bezonas, kiu apogas la katolikajn gazetojn en ilia malfacila batalado, kiu esploras la malklarajn fontojn de kalumnio kaj mensogo kaj malkovras ĝiajn kanalojn, kiu kolektas materialon pri ĉiuj okazintaĵoj, rilataj al eklezio kaj lernejo, politiko kaj scienco, interesantaj la katolikan mondon.

Sed internacia, disvastigata tra la tuta mondo, devas esti tia institucio, same tiel internacia kiel la malklaraj kanaloj de la ekleziaj kontraŭuloj nune sulkgigas la tutan terglobon.

„Vasto e grande” nomis Lia Sankteco Pio X tian projekton.

Nu, tian projekton ellabori en ĝia tuta amplekseco, fariĝos la tasko de la Munĥena oficejo: „Katolika Mondkorespondado”. Tiu ĉi institucio jam senmaskigis dum sia dujara ekzistado dekduojn da tute falsaj pripastraj kalumnioj, forsendis multajn milojn da artikoloj kaj sciigoj klarigantaj kaj kontraŭbatalantaj; tiu ĉi institucio estas laŭ la opinio de multaj altrangaj personoj kaj gazetoj „bonega entrepreno”, kiu certe efektiviĝos en la katolika vivo „tre multe da bono”.

Tion plene komprenis viroj progresemaj, pastroj el ĉia rango, ĵurnalistoj, profesoroj, doktoroj, instruistoj kaj aliaj personoj diverslandaj, kiuj nun estas laboremaj por konstruigi kaj disvastigi tiun ĉi bonegan oficejon, por ke ĝi vere fariĝu internacia katolika klariga kaj kontraŭbatala institucio, por ke ni fine laŭlonge tiu ĉi vojo akiru:

„INTERNACIAN TELEGRAF-AGENTEJON”.

Tial ĉiu helpu al ni, kiu legas tiujn ĉi liniojn. Malgranda ja estas la komenco, tamen grandega estos la gajno.

Tial kune kun la helpo de la katolikaro tutmonda ni efektiviĝos tiun ĉi belegan celon, starigante akcian societeton; sed por tio ni certe atendas, ke vi donu vian apogon per aĉeto de almenaŭ unu akcio, je valoro de nur 30.25 Guldenoj (= proks. 25.— Spesmiloj), sed por tio ni certe atendas, ke vi faru donacojn ĉu malgrandajn ĉu grandajn; sekvu la belan ekzemplon de konata ĉefepiskopo, kiu ĉiunmonate financapogas nian entreprenon.

Plie: parto de la neta gajno estos i. a. fiksata: por starigi profesorseĝon pri katolika gazetar-metio kaj por stipendioj, apogante tiamaniere neriĉajn katolikajn ĵurnalistojn.

Nobla, alta celo! Vere brila celo! Ĝi rilatas al la plej grava laboro, kiu hodiaŭ povas esti kreita en la signo de la kruco!

La Organiza-komitato de la „INTERNACIA TELEGRAF-AGENTEJO”

Anglujo: S-ro M. Heron, Edinburgh; S-ro H. Höveler, London; P-ro P. Parker, Kilmyshall; P-ro M. O'Connell, Enniscorthy.

Aŭstrujo: P-ro A. Denkoviĉ, Sarajevo (Bosnio); S-ro E. Esterak, instruisto M. Ostrau; S-ro J. Franco, studento, Brixen; S-ro A. Halbedlum, Gratz; S-ro J. Hörl, instruisto, Wien; P-ro L. Koller, Göttweig; S-ro R. Martischnig, Villach; S-ro H. Nowicki, landa oficisto, Lwow; P-ro S. Szpunar, Jaroslav; P-ro J. Szurek, Lonczki (Galicio).

Belgujo: P-ro J. v. Doorselaer, Prof-ro de Inst. „St. Louis”, Bruselo; Lia Moŝto P-ro A. Richardson, Prez. de I.K.U.E., Bruselo.

Francujo: S-ro C. Colas, Paris; P-ro Desray, Ancenis.

Germanujo: Lia Preposta Moŝto Becker, Bromberg; F-ino I. Hornung, Aŭgsburg; S-ro J. Kral, ĉefredaktoro de „K. W.”, Münschen; S-ro Sämmer, grafa Privatsekr., Wechselburg; P-ro Thalmeier, Otting.

Hispanujo: D-ro J. Casanovas, Geronó; D-ro J. Coll, Univers. Prof-ro, Barcelona; P-ro K. Planell, Barcelona; P-ro P. Plana, Ventalló; S-ro P. Costa, Coloma de Farnés; S-ro J. Costa, Prez. de „Studenta Juneco”, Geronó.

Hungarujo: D-ro C. Vörös, Budapest; P-ro J. Kozma, Mezözombor.

Italujo: P-ro J. Bianchini, Fontanafredda; Kan. P. Fevacchio, Medica (Sic.).

Nederlando: Lia Monsinjora Moŝto A. Diepen, Den Bosch; P-ro H. Linnebank, Uden; P-ro L. Poell, Tilburg; S-ro Fr. Sleyffers, Den Haag; D-ro J. Smulders, ĉef-

redaktoro de „E. K.”, Udenhout; S-ro P. Janssen, kunlaboranto de „K. W.”, Amsterdam.

Rusujo: Prof-ro A. Dombrovski, Kovno; P-ro V. Linowiecki, Strasçvo.

Sirio: P-ro J. Schmitz, Direk. de la Kat. Germ. Hospico, Jerusalem.

Svisujo: Prof-ro W. Arnold, Zug; S-ro J. Forestier, Genève; S-ino M. Milson, Genève.

Usono: P-ro M. Mojado, St. Louis.

P.S. Bonvolu sendi viajn informojn, demandojn k.t.p. al la landa reprezentanto (S-ro) en*)

*) Ni afable petas al niaj aliĝintoj çe la traduko de tiu çi alvoko por la *katolika* gazetaro enskribi çi tie *ilian propran nomon*.

Poste Vi povas sendi leterojn, petojn k.t.p., tradukitajn, al **S-ro P. Janssen, Nieuwendijk 183, Amsterdam.**

Oficialaj Sciigoj.

Internacia Pilgrimo Katolika

kaj 4-a Intern. Kongreso de Katolikoj Esperantistaj.

KOMITATO:

ORGANIZA KOMITATO: Prezidanto: Abato RICHARDSON, 121, rue du Marais, Bruxelles; Sekretario: Claudius COLAS, 51, rue de Clichy, Paris; Kasistino; F-ino M. LARROCHE, 55, rue de Vaugirard, Paris.

LOKA KOMITATO: Monsinjoro Luigi GIAMBENE, Lungotevere dei Mellini, 51, Roma; S-ro FOSELLI; S-ro DOTTA-RELLI.

Helpanto: R. P. MERCIER, dominikano.

INTERNACIA KOMITATO. Prezidanto: Mons. Prelato GIESSWEIN, deputato, en Budapest; Italujo: Abato BIANCHINI en Fontanafredda di Pordenone (Udine); Aŭstrio: B. ULM, en Wien; Belgujo: S-ro VERMANDEL en Antver-

peno; Germanujo: P-ro BECKER, en Bromberg; Irlando: P-ro PARKER, en Kilmeshall; Katalunujo kaj Hispanujo: P-ro COLL, en Barcelone; Litovujo kaj Rusujo: P-ro DOMBROVSKI, en Kovno; Nederlando: F-ino BORRET, en Hago; Polujo: P-ro SZUREK; Svislando: S-ino MILSOM, en Genevo.

Informoj.

La alveno de la kongresanoj en Romo devos okazi la 3-an de Septembro. Veturiloj havantaj Esperantan flagegon kondukos ilin al la difinita hotelo.

La kongreso komencos la *4-an de Septembro per speciala Meso*, solena malferma kunveno, kaj vizito, dum posttagmezo, de la Baziliko Sankta Petro kaj diversaj sanktaj lokoj.

La kongresanoj restos dum *6 plenaj tagoj* en Romo. T. e. la 4, 5, 6, 7, 8 kaj 9 de Septembro.

Laborkunsidoj. Krom la solena kunveno, tri aŭ kvar laborkunsidoj estos dediĉitaj al la pritraktotaj temoj, kiuj estas:

a) *Defendo internacia de la Sankta Eklezio.* Kiamaniere ni povas *praktike* helpi al tia defendo? (Ĉefraportisto: S-ro JANSSEN).

b) *Katolikaj misioj en fremdaj landoj.* Ĉu Esperanto povas helpi al la disvastigado de la katolika fido? Kiamaniere? (Ĉefraportisto: Pastro BIANCHINI).

c) *Unuiĝo de la disigintaj Eklezioj al la Roma Seĝo.* Kiamaniere jam helpis Esperanto, kiamaniere I.K.U.E, povas ĝin ankoraŭ antaŭenpuŝi (Raportisto: P-ro RICHARDSON, S-ro NANKIVELL eksanglikana pastro konvertita, k. t. p.).

Alia kunveno okazos, verŝajne ĉe la abatejo de Sankta Paŭlo-je-tri-fontoj, en kiu oni traktos pri la ĝenerala stato de I.K.U.E. pri *Espero Katolika*, niaj komitatoj, k. t. p.

Pluaj temoj: Pacifismo, Katolika junularo (enketo), estos ankaŭ aldone preparolataj dum la laborkunsidoj.

Estas *nepre rekomendite* al la raportantoj, ke iliaj raportoj estu mallongaj, substancoplenaj, kaj ke ilia legado ne daŭru pli ol 10—12 minutoj.

Ĉiu ĉeestanto rajtos preparoli la temon, alporti faktojn

aŭ argumentojn de sia lando, sed ne devos paroli dum pli ol 5 minutoj. Nur per severa submetiĝo al tia disciplino povos esti farata *bona laboro*, kaj estos lasita la necesa tempo por la vizito de Romo.

Vizito de Romo.

Kiel en ĉiu pilgrimo la vizito de Romo estas konsiderota kiel absolute necesa parto de „nia Kvara”.

Tian viziton oni ne povus fari en kelkaj tagoj, se ĝi ne estus farita, laŭ la kutimo de pilgrimoj, **metode**, kaj **veturile**. Tial, la komitato konsentis kun speciala Agentejo, kiu kutime zorgas pri la pilgrimoj.

Jen kelkaj el la vizitotaj lokoj:

Bazilikoj kaj preĝejoj: S. Petro, S. Paulo ekster muroj, S. Johano Laterano, S. Kruco Jeruzalem, S. Maria Majora, S. Laurento, S. Maria de Anĝeloj, S. Petro encenata, SS. Apostoloj, „Scala Sancta” k. t. p.

Muzeoj de Vatikano, Kapitolo, Pinakoteko. k. t. p.

Placoj kaj Fontoj: (S. Petro, Trevi, Colonna).

Antikvaĵoj: Kolizeo, Foro, termoj de Doikleciano, Triumfarkoj, Ruinoj diversaj, Temploj, Kolonoj, Karcerio mamer-tina, k. t. p.

Okazos ankaŭ ekskurso al la Abatejo de S. Paŭlo-je-tri-Fontoj.

Religiaj Vidpunktoj.

La partoprenantoj devos memori, ke pilgrimo estas **pia ago**, kaj kiel eble plej multe ili klopodos por sanktigi la tagojn de ilia ĉeestado en la Eterna Urbo. Nur je tia kondiĉo ili ĉerpos el ĝi la spiritajn fruktojn, kiujn ili *devos* celi, kaj altiros la Dian benon sur la laborojn de la kongreso, kaj sur la Esperantistan movadon.

Tial, ĉiutage okazos por ili Meso. Esperantistaj konfesprenantoj estos ankaŭ je la dispono de niaj amikoj. Meso kun ĝenerala komunio okazos en la katakomboj de Sankta Kalisto, kie ripozas „*in pace*” centmiloj da kristanoj mortigitaj pro ilia fido al Kristo.

Kosto.

Imitante la ekzemplon de la klasikaj pilgrimoj, la organiza komitato faris por la tuta 6-taga ĉeestado en Romo kolektan aranĝon, kiu prezentos duoblan agrablaĵon: 1e. Tre gravan ŝparon da mono; 2e. Kunecon de ĉiuj kongresanoj kiuj havos, tiel, la ĝojon manĝi kaj loĝi en la sama hotelo.

La prezo por ĉiu ĉeestado estas Fr. 70 (Sm. 28) entenanta 1e 6-tagan vivadon; 2e 6-noktan liton; 3e eniron en la muzeojn, k. t. p.; 4e ĝuadon de veturiloj por la promenado (4 personoj en ĉiu veturilo); 5e fine *Oficialan aliĝon al la Romana Komisiono de pilgrimoj*, kiu sola rajtas havigi aŭdiencon de la Sankta Patro.

Ĉiuj kiuj jam organizis pilgrimon rekonas, ke tiu sumo da Fr. 70 estas *treege malalta*. La ĉambroj estas grandaj ĉambroj havantaj du aŭ tri litojn. Ĉiu pilgrimanto, kiu deziras havi apartan ĉambron, povos ĝin havi kondiĉe, ke li tion notu sur la aliĝilo. Li pagos en Roma mem la pluan sumon (inter 1 kaj 2 frankoj po nokto).

Antaŭ- kaj Post-Kongreso.

Tuj post la kongreso en Bern, okazos en Milano la nacia kongreso de la Italaj Esperantistoj. S-ro P-ro BIANCHINI invitas la katolikojn, kiuj iros al Romo, trapasi Milanon, kaj halti tie la 2-an de Septembro, kie speciala renkontiĝo povos okazi.

Grupan vojaĝon Milano-Roma oni aranĝos la 3-an de Septembro.

La 9-an de Septembro nokte, foriros el Romo la karavano vizitonta Napolon kaj Pompeion. La kosto de tiu 2-taga vojaĝo estos *proksimume* Fr. 35 (enkalkulite manĝado kaj ununokta vivado en Napolo).

Ni tre konsilas al ĉiuj niaj amikoj, kiuj tion povos, partopreni tiun tre interesan ekskurson.

Fervojoj.

Pro la internacia karaktero de la pilgrimo, kaj ĉar la

membroj venos el ĉiuj punktoj de l' mondo, la aranĝo de araj vojaĝoj estas tre malfacilaj.

Ni invitas ĉiun aliĝanton konsenti kun la komitatano de sia lando por aranĝi, se eble, kolektan vojaĝon.

La italaj fervojoj konsentas tre gravan rabaton. La kondiĉojn de ĝia uzado ni konigos ĝustatempe al ĉiu aliĝanto aparte.

El Parizo ekzistas *tre bonaj kombinoj*, kiujn povos ĝui ne nur francoj, sed ankaŭ angloj, belgoj, aŭ aliaj kiuj trairos Parizon.

Tiuj kombinoj egalvaloras rabaton da 30 pCt. Jen la plej praktikaj:

a. Paris-Romon *via* Dijon, Modane, Mont-Cenis, Torino, Genova, kun reveno per la sama vojo kaj laŭvola halto (valoranta 30 tagoj): 2-a klaso Fr. 177; 3-a klaso Fr. 115.

b. Paris—Romon *via* Simplon, Milano, Firenze kaj reveno (nur 1-a kaj 2-a klaso). Prezo por la 2-a klaso: Fr. 178. Valoranta dum 45 tagoj.

c. Paris, Laussanne, Domodossola (itala landlimo ĉe Simplon'a Tunelo) kaj reveno; 2a klaso: fr. 90, 3a klaso: fr. 59 (valoranta dum 30 tagoj). Poste: utiligo, de Domodossola al Romo, de la italaj rabatoj. (Proksimuma kosto de la vojaĝo: Fr. 110).

La personoj dizirantaj partopreni en la Berna kongreso povos utiligi laŭvole la du lastajn kombinojn, ĉar ili rajtas halti en vojo, ili nur bezonos aĉeti en Lausanne return-bileton „Lausanne—Berne—Lausanne” kaj tiel la du vojaĝoj kombinitaj kostos malkare.

Sume, la *tuta partopreno* en nia kongresa pilgrimo kostos, el Parizo, *malpli da 200 frankoj*.

Ekzistas ankoraŭ multaj kombinoj, sed ilin oni povas nur montri al la interesatoj, kiam la ĝusta nombro de la partoprenontoj, kaj la vojo sekvata de ili, estos konata de la komitato.

Tial la aliĝoj *devas esti absolute resenditaj al la kasistino antaŭ la 10a de Aŭgusto*.

Ni faros nur ekcepton por la neeŭropaj partoprenantoj.

La sumon da Fr. 70 por la ĉeestado en Romo oni devos

sendi antaŭ la 20a de Aŭgusto al F-ino LARROCHE, 55, *rue de Vaugirard, Paris. (Francujo).* ¹⁾

Post tiu dato la prokrastuloj sendos la monon al la jena adreso: S-ro FERRAILOLO, *Agento de la Esperantista Pilgrimo, Piazza della Minerva, Romo (Italujo).* ¹⁾

Morala partopreno.

La deziro de la Komitato estas, kompreneble, ke ĉiu katolika Esperantisto povu partopreni en tiu bela manifestacio de nia movado, kaj alporti al la Sankto Patro la esprimon de sia amo kaj fila submetiĝo.

Sed ni scias, ho ve! ke multaj, malgraŭ sia deziro ne povas tion fari. Ili almenaŭ partoprenu *per la animo* kaj per la koro.

Ciuj grupoj aŭ membroj de nia katolika movado, kiuj ne povas ĉeesti la Roman kongreson, sendu almenaŭ leteron, aŭ poŝtkarton, aŭ telegramon, — aŭ, ankoraŭ laboron pri la traktotaj temoj. Ĉio estos transdonita al la sekretario de la kongreso kaj legita en la kunsidoj. Ili montros tiamaniere, ke en ĉiuj partoj de l' mondo centoj da koroj batas por la sankta komuna afero. Ni speciale invitas la neeŭropajn Esperantistojn fari tion. Ciujn leterojn, kartojn aŭ telegramojn oni povas sendi al Monsinjoro GIAMBENE, *Lungotevere dei Mellini 51, Roma.*

CL. COLAS.

Eldonoj de la Komitato.

- 1e. *Propagandaj markoj* (4 koloroj) 100 ekz.: fr. 0.60 (afrankite fr. 0.70).
- 2e. *Poŝtkartoj*. 5 centimoj (2 sd.) por ĉiu. Minimuma mendo: 12 ekzempleroj. Afranka sendo.
- 3e. *Afiŝoj*. (M. 0.60 × M. 0.40) 4 diversaj koloroj. Al ĉiu, kiu sendas fr. 0.50 (20 sd. — 2 respondkuponoj) oni sendas 4 diverskolorajn afiŝojn. Ĉiu plua afiŝo kostas fr. 0.10.

¹⁾ Se okaze, persono aliĝinta estus je la lasta momento malhelpita partopreni la pilgrimon, la kongreskaso resendus la monon, krom depreno da 10⁰/₀ por la faritaj elspezoj.

4e. *Cirkuleroj.* 1 aŭ 2 ekz. senpage al ĉiu petanto. Po disdono; 100 ekzempl. fr. 1.50; 50 ekz. fr. 0.80; 25 ekz. fr. 0.50.

SCIIGOJ PRI LA ARĤIVO DE I. K. U. E.

Laŭ peto de lia moŝto A. RICHARDSON, Prezidanto de I. K. U. E., la ĉefredaktoro de „E. K.” D-ro SMULDERS, konsentis akcepti kaj tenadi je dispono de tiu, kiun al ĝi rajtigos la estinta kunveno de I. K. U. E.anoj, la protokolaron de I. K. U. E. tian, kian mi eblis arĥivi ĝin.

Por eviti postajn malagrablojn mi ĉi-tie oficiale konstatas, ke al la protokolaro mankas diversaj dokumentoj, kiuj al ĝi apartenas, sed kiujn malgraŭ miaj multnombraj klopodoj kaj repetitaj petoj mi ne sukcesis akiri, i. a. la paroladoj de S-ro COLAS dum „Nia Unua” en Parizo, la legado de la sama dum „Nia Tria” en Budapest, la oficiala Raporto de „Nia Tria” farota de l’ konstanta kongressekretario k. t. p.

De „Nia Dua” en Hago mi neniam ricevis iun ajn dokumenton, sed oni sciigis min, ke la protokolaro, kiun ordigis S-ro SLEIJFFERS, estas je dispono de „E. K.”, ĉar pro ne sufiĉa helpo financa la kongreslibro de „Nia Dua” ne povis esti presigita.

Ĉar la I. K. U. E.ano pere de sia ĉefrepresentanto, lia moŝto Abato RICHARDSON, skribe senŝargis min, mi plenkonfide transdonas la protokolaron al S-ro D-ro SMULDERS, kiu de tempo al tempo laŭ interkonsilo de la religia konsilanto de „E. K.” publikigos tiujn dokumentojn en nia oficiala Gazeto, por ke ankaŭ tiuj; kiuj ne eblis ĉeesti niajn kongresojn, povu tiamaniere profiti la paroladojn kaj legadojn dumkongrese okazintajn. La protokolaro, kiun mi transdonis al D-ro SMULDERS, ekzistas *a.* el la dokumentoj, kiujn I. K. U. E. ŝuldas al la efikaj zorgoj de nia agema samideanino lia moŝto LARROCHE en Parizo, *b.* el la doku-

mentoj, kiujn mi eblis kolekti en Budapest. Esperante, ke ĉiuj I. K. U. E.anoj pravigos tiun transdonon, mi ilin salutas.

Estimege

Tilburg. FRANS KNAAPEN,
eksiĝinta sekr. ĝen. de I. K. U. E.

Notu bone: Pro manko da loko mi forstrekis la detaladon de l' dokumentoj suprediritaj, kaj detalis ilin nur je la kvitanco, kiun mi havigis al S-ro KNAAPEN.

D-ro SMULDERS,
Provizora arĥivisto.

Al la Akciuloj de la Anonima Akcia Societo „Espero Katolika”.

La akciulara kunveno ĝenerala de nia Societo „Espero Katolika” tiun ĉi jaron laŭstatute (art. 19-a) okazos en Romo dum nia Kvara Katolika Kongreso Esperantista.

Konforme al la sama artikolo mi do havas la honoron kunvoki la geakciulojn de „Espero Katolika” al la statuta kunveno ĝenerala dumkongrese tenota.

Mi atentigis la akciulojn, kiuj intencas partopreni la ĝeneralan kunvenon, ke ili devas antaŭe averti la *Direktoron D-ron Smulders, Udenhout, Nederlando*, kaj ke anstataŭigo estas permesata per skriba rajtigilo (vidu art. 24 de la Statutoj).

Ĉar la Direktoro-Administranto S-ro Sleijffers pro grava malsano ne povis ĝustatempe prepari la bilancon k.t.p., mi ne povas presigi ĝin (laŭ art. 26 de la Statutoj) jam en tiu ĉi numero de E. K. Tamen *aparta* numero de E. K., elironta 25 Aŭgusto, kaj sendota al la akciuloj (ankaŭ havebla dum la kongreso) enhavos la bilancon kaj raportojn pri la Akcia Societo, kaj tagon, horon kaj agendon de la ĝenerala kunveno de la akciuloj.

La Prezidanto-Komisaro de E. K.,
Frans KNAAPEN.

TILBURG, la 20-an de Julio 1913.

Redakciaj Sciigoj.

Laŭkutime pro la diversaj Kongresoj **Espero Katolika NE estos eldonata en Septembro.**

Insiste ni petas, ke oni tiun ĉi jaron ne forgesu alsend al E. K. raportojn pri la specialaj kunvenoj de Katolikoj dum la diversaj kongresoj.

D-ro S.

Esperanto-Movado.

LINGVA KOMITATO.

Oficialaj decidoj kaj komunikoj.

Pri la vortfarado.

En la numero 50 de *Oficiala Gazeto*, ni publikigis la raporton de la Komisio pri vortfarado, kun teksto, kiun la Akademio akceptis, laŭ propono de tiu Komisio. Tiun tekston ni submetis al la aprobo de la Lingva Komitato, laŭ regulo 22 de nia Regularo.

Ĉar tri monatojn por ĝia publikigo, ĝi ne estas malakceptita de unu triono de la Komitato, ĝi fariĝas oficiala, kaj ni petas la esperantistajn gazetojn ĝin represi.

Jen tiu teksto, jam publikigita en la numero 50 de *Oficiala Gazeto*:

1. *La Akademio opinias, ke la vortforado en Esperanto estas fondita sur la logika kaj senpera konstruo de ĉiu aparta vorto, kaj ne sur tiel nomitaj „reguloj de derivado”: ke reguloj de derivado malutilus al la lingvo, agante kontraŭ ĝia normala funkciado, ke tiaj reguloj alportus arbitrajn elementojn, ĝenantajn por la skribata lingvo kaj malutilajn por la parolata lingvo.*

2. *La Akademio opinias, ke kelkaj aŭtoroj trouzas sufiksojn: tio estas preskaŭ neevitebla en la parolata lingvo, sed tio estigas la skribatan lingvon nenecese peza. La kaŭzo de tiu trouzo kuŝas en la fakto, ke nevole oni ofte tro insistas sur ĉio esprimota ideo por ĝin penetrigi pli*

forte en spiriton de l' aŭskultanto aŭ de l' leganto. Ĉar aliflanke, oni ne devas tiom ŝparegi la sufiksojn, ke la vortoj fariĝas nekompreneblaj, estas konsilinde difini la limojn, inter kiuj oni devas resti, tiamaniere, ke oni lasos al arbitro kaj al personaj preferoj rolon kiel eble plej malgrandan.

La Akademio do rekomendas al la esperantistaj aŭtoroj, ke ili sekvu la du jenajn principojn, kiuj kontraŭstaras unu la alian kaj estas la logika bazo de vortfarado en Esperanto:

a) Principo de neceso: en konstruon de vorto oni devas enkonduki ĉiujn vortradikojn, sufiksojn, prefiksojn kaj finiĝojn necesajn por elvoki klare kaj plene la ideon reprezentotan de tiu vorto;

b) Principo de sufiĉo: se la ideo tiamaniere esprimita estas jam bone kaj nekonfuzeble komprenata el la kunteksto sen iu el la sufiksoj uzitaj, tiu ĉi sufikso povas esti elĵetata kiel neutila kaj nenecesa.

*El Oficiala Gazeto Esperantista.
25 Majo 1913.*

MIKSAĴO.

ITALUJO.

Leĝo kontraŭ Virin-komercaĉo.

Ministro Ĝiolitti per cirkulero al ĉiuj provincestroj ordonas doni al la malfeliĉinoj, kiuj volas reiri sian hejmon, la necesan helpon por vojaĝi sur ŝtataj fervojoj de la tuta Italujo, t. e. de loko kie ili troviĝas ĝis ŝtatlimoj. Sed por tio estas necese, ke la Registaro ricevu informojn kiel eble plej detalajn pere de italaj konsuloj aŭ per eksterlandaj aŭtoritatoj.

Dum atendado de necesaj dokumentoj por senpaga vojaĝo oni enloĝos la junulinon ĉe ia publika aŭ privata honesta persono. Tiacele la provincestroj devas ordigi la agadon de la oficoj de publika policejo kun la provinca ofichelpo.

Kiam ĉu pro aĝo, ĉu pro kondiĉoj de sano necesas akompanigi la malfeliĉulino dum la vojaĝo, la provincestrojn prizorgos pere de taŭgaj virinoj, aŭ kiam ne estas eble trovi virinojn, tion oni faros per policanoj, se eble, edziĝitaj. Virinoj akompanantaj havos senpagan vojaĝon kaj rekompencan.

Grava Admono.

En Italujo oni faris leĝon, per kiu oni tute malpermesas kunporti kian ajn armilon, eĉ razilojn por sin razi, eĉ tranĉileton por tranĉi fruktojn kaj panon, aŭ akriĝi kraĵon. Oni povas nur kunporti tranĉiletojn malpli longaj ol *kvar* centimetrojn kaj kun ekstremaĵo iomete kurba kaj ne akriĝita. Kiuj portos kian ajn armilon estos nepre arestitaj. — Tiu admono estas kompreneble por la honestaj samideanoj, kiuj intencas viziti Italujon. Krimuloj intencantaj mortigi aliajn aŭ sin mem povos, kompreneble, kunporti kian ajn armilon. Italujo havas bonegan celon lasi pereigi krimulojn kaj savi senkulpajn honestulojn!

P.

Morto de Monsinjoro Delamaire.

Monsinjoro Delamaire, ĉefepiskopo de Cambrai mortis la 20-an de Julio, en Cancale (Franca Britanlando) helpita de Monsinjoro DUBOURG, ĉefepiskopo de Rennes, de kiu ni publikigis, en unu el niaj lastaj numeroj, eltiraĵojn pri Romo kaj la Papo.

Monsinjoro DELAMAIRE naskiĝis en Parizo la 4-an de Februaro 1848. Li estis pastro de N. D. de la Kampoj, kiam Leono XIII elektis lin por la episkopa seĝo de Périgueux la 15-an de Aprilo 1901. Lia apostola reputacio meritis al li kontraŭiĝon de la respublika regado. Tamen li estis akceptita.

Post kvin jaroj, la 3-an de Septembro 1906, Pio X enoficigis lin kunhelpanto de Monsinjoro Sonnois, ĉefepiskopo de Cambrai, kiun mortitan antaŭ ne longe li anstataŭis.

Monsinjoro Delamaire havis nur de post kelkaj monatoj kunhelpanton Monsinjonon CHAROST. Max ROUB.

LA ANGELA SALUTO

Metro rapide

de G. H. OOGVEEEN

Tenor $\frac{1}{2}$

Sa-lu-ton Ma-ri-o gra-co ple-na

Bas $\frac{1}{2}$

la Sin-jo-ro es-tas kun

la Sin-jo-ro es-tas kun vi Vi es-tas be-na-ta

in-ter la vi-ri-noj kaj be-na-ta es-tas la fruk-to de

in-ter la vi-ri-noj kaj be-na-ta es-tas la fruk-to de

vi-a kar-no Je-su-o sank-ta Ma-ri-o Di-pa

vi-a kar-no Je-su-o sank-ta Ma-ri-o Di-pa

malrapide

-tri-no pre-gu por ni pe-ku-loj pre-gu por ni pe-ku-loj

unua tempo

nun nun n-u-n kaj en la ho-ro de ni-a mor-

A-men

to *ff* A-men A-men A-men

A-men A-men